

## Partizánske: Ĉu plia Esperanto-urbo?

La slovakia urbo Partizánske havas nur 25 mil enloĝantojn, sed inter la esperantistoj ĝi estas tre bone konata. Lastatempe tion komencis rimarki ankaŭ la urbaj instancoj, kaj se ilia favoro daŭros, la konata Esperanto-urbo Herzberg eble baldaŭ havos paralelon en Slovakio. P. Baláž, loĝanto de Partizánske, aktivis por Esperanto jam ekde 2003, kaj la internacia organizo E@I, kies agadon li kunordigas, estas registrita tie ekde la jaro 2005. Ekde la 1-a de julio en Partizánske situas la oficejo de E@I, ĝia unua fizika sidejo. Temas pri ejo de 60 m<sup>2</sup>, tuj malantaŭ la urbodomo. La urbo ebligis la realigon, disponigante la ejon kontraŭ simbola unu eŭro jare. Staĝon ĉe E@I faris samtempe tri junaj esperantistoj: M. Desplantes el Francio, J. Diego Díaz Bautista el Hispanio kaj M. Hruška el Ĉeĥio. Kun helpo de E@I kaj laŭ la antaŭa ekzemplo de M. Blahuš, ili ĉiuj sukcesis atingi stipendion per la EU-programo Erasmus.

(UEA-revuo *Esperanto*, oktobro 2011, retgrupo „aŭstraj esperantistoj“)

## Projekto „Esperanto-tago 2012“

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) komencis la laboron por la jubilea jaro 2012: la Projekto 125 konsistas el tri agadoj: reta kurso en 125 mallongaj lecionoj (kiun la landaj sekcioj de ILEI propagandos), granda informa agado kunlige kun la Esperanto-tago en 2012 kaj aliaj agadoj farotaj de la unuopaj landaj aŭ fakaj asocioj.

([http://uea.org/vikio/Projekto\\_125](http://uea.org/vikio/Projekto_125))

## Esperanto-Muzeo Svitavy trijara

Antaŭ tri jaroj la Ĉeĥa Esperanto-Asocio inaŭguris Esperanto-Muzeon en urbo Svitavy. Ĝian ekeston grave

finance subtenis Muzeo pri Kulturo de Ĉeĥa Respubliko, la urbo Svitavy kaj la fondaĵo Esperantic Studies Foundation. La ĉefaj celoj de la muzeo estas multflanke informi pri Esperanto, pri ĝiaj historio kaj bezonateco kaj utiligeblecoj, okazigi portempajn temajn ekspoziciojn kaj kulturajn kaj klerigajn aranĝojn, prilabori kaj alirebligigi Esperanto-bibliotekon kaj vendi librojn. La nuntempa ekspozicio (ĝis fino de Majo 2012), nomiĝas „Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto“. La librofonduso estis oficiale alirebligita por publiko. Ĝis nun estis prilaboritaj pli ol 9.600 libroj kaj gazetjarkolektoj. En la muzea paĝo estis verkita aparta rubriko pri la biblioteko, kie troveblas ankaŭ katalogo de libroj kaj gazetoj. Svitavy situas en Bohemia-moravia limlando, kiu estas facile trafike atingebla. Ĝi estas i.a. naskiĝloko de Oskar Schindler, fama savinto de judoj dum la dua mondmilito, kun kies vivo oni povas konatiĝi en la urba muzeo.

([www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz))

## Fina deklaro de UN-konferenco: sukceso por UEA

La amendoj pri lingvaj rajtoj, proponitaj de UEA, eniris la definitivan version de la fina deklaro de la 64-a Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO), kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj (UN) okazigis en Bonn. Kiel delegitoj de UEA partoprenis Marcos Cramer, Stefan Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer. Dum la konferenco ili havis multajn okazojn por interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kaj interŝanĝi ideojn, informilojn kaj kontaktkartojn. La temo de la konferenco estis „Daŭrigeblaj socioj – respondecaj civitanoj“. Post la konferenco la respondeculoj pri la fina deklaro daŭrigis la traktadon de la ŝanĝoproponoj, akceptante ĉiujn faritajn de la delegitaro de UEA. Kvankam la deklaro de la NRO-konferenco en si

mem ne reprezentas la sintenon de UN, ĝi aperos en la dokumentaro de UN kaj havas valoron kiel morala premo de la civila socio al la monda organizaĵo. Legu pli: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj>. (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## TEJO partoprenis la Junularan Forumon de Unesko

Du reprezentantoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) partoprenis Junularan Forumon de Unesko en Parizo. Dum la preparado de rekomendoj por la baldaŭa ĝenerala konferenco de Unesko iliaj argumentoj por lingva diverseco ricevis subtenon de aliaj junularaj delegitoj. Tamen en la fina dokumento la mencio pri lingva diverseco kiel grava ero de kultura diverseco estis forstrekita. Ankaŭ en alia temkunsido la reprezentanto de TEJO, Nico Huurman, havis similajn spertojn. En sia unua raporto pri la kunsido ili konkludas, ke la tagordo de la Junulara Forumo donis tre malmulte da tempo al vera debato inter la delegitoj, sed ke estis multe da interesiĝo inter la partoprenantoj, precipe inter la delegitoj el Sud-Ameriko. Ajnakaze la partopreno de TEJO en similaj aranĝoj povas utili, ili konstatas: „Junuloj de TEJO havas verŝajne pli da ŝanco por influi debatojn kaj rekomendojn en tia forumo ol la iom malpli junaj de UEA aŭ aliaj plenkreskulaj organizoj, ĉar junuloj pli akceptas riskajn rekomendojn kaj emas ŝanĝi la mondon“.

([www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org))

## Ĉina Esperanto-insulo volas konstrui ponton inter kontinentoj

En januaro 2012 jam la trian fojon okazos tutmonata kurso pri Esperanto en la universitato de Hajnano. „Esperanto-insulo“ estas la sudĉina insulo nomata ĉinlingve Hai Nan Dao

(Maro-Sudo-Insulo) kaj Esperante: Hajnano. Ĝi proksimas al Hanojo, kie okazos la Universala Kongreso de 2012. Ĉi-foje krom Esperanto-instruado al novuloj estas planataj ankaŭ du universitatnivelaĵoj kursoj en Esperanto. En la dua jaro deko da homoj ĉeestis dum tuta monato, kaj por la jaro 2012 jam estas kvindekda aliĝintoj el dek du landoj - rakontas Dennis Keefe, kiu iniciatis la projekton, en intervjuo al Libera Folio. ([www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org); [www.esperanto-insulo.info/](http://www.esperanto-insulo.info/))

## 26a de septembro - Eŭropa Tago de Lingvoj jam 10an fojon

La 26a de septembro jam de 10 jaroj estas dediĉita al la lingvoj. En tiu tago okazas centoj da eventoj dise en Eŭropo por celebri la lingvan riĉecon de nia planedo kaj por atentigi pri la graveco de lingvolernado. ILEI utiligas tiun tagon por la kampanjo „Instruu vian lingvon pere de Esperanto“. (<http://edukado.net>)

## Son-retejo Esperanta en Ipernity

Ĉe la ttt-ejo Ipernity ekzistas Sonbanko Esperanta, kiu disponigas al la uzantoj 1055 sondosierojn en Esperanto, ekz. de William Auld: [www.ipernity.com/doc/69959/11343832](http://www.ipernity.com/doc/69959/11343832) (A. Sartorato, Brazilo)

## TED kaj Esperanto

La retejo [www.ted.com](http://www.ted.com) prezentas video-prelegojn pri „teknologio, amuzo, dezajno“ (TED) kaj intertempe ankaŭ pri komerco, scienco, tutmondaj temoj. Entute proks. mil prelegoj, inter 5 kaj 20 minutoj. Temas pri aktualaj temoj, ĵusaj esploroj: ofte frapaj sciigoj, kiel ekzemple pri artefarita birdo, birdoroboto, kiu flugas tra prelegejo. En Esperanton oni intertempe tradukis 27 prelegojn, inter la lingvoj Esperanto havas per tio lokon 50. (Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand)

## Tago de la paco kaj tago de la lingvoj en Italio

Itala Esperanto-Federacio partoprenis la 24-an de Septembro informan agadon ĉe granda tutlanda „Marŝo por paco“. Dudeko da volontuloj staris en loko, kie marŝantoj (200.000) pasas. Tie grandaj literoj prezentis nepre videble la vorton „Esperanto“, kaj tiuj, kiuj montris intereson, ricevis flugfoliojn ekz. kun la adresoj de la Esperanto-grupoj, informo pri la retaj kursoj. 5.000 antaŭpretigitaj informiloj estis disdonataj dum du horoj. Efiko je la aliĝo al la retaj kursoj estis tuj konstatabla la postan matenon

(Renato Corsetti)

## Tuttempa Esperanta radio „Muzaiko“

24 horojn en tago Muzaiko ludas muzikon, programerojn, novaĵojn, informojn, raportojn kaj arkivaĵojn kaj havas ĉiutage unuhoran novan elsendon, kiu estas ludata 8-foje dum la tago. Por aŭskulti ĝin aŭ vidi la programon vizitu la retpaĝon de <http://muzaiko.info>.

## Prelego pri Erasmo en la Reta Kinejo

En la 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 14-an de Majo d-ino Věra Barandovská-Frank prelegis pri la humanisto Erasmo de Roterdamo. La temo estis elektita omaĝe al la 500-a datreveno de la plej fama verko de Erasmo, Laŭdo de l'stulteco. Esperanta eldono de la verko, tradukita de Gerrit Berveling, aperis en 1988. La prelego estas spektebla en tri partoj en la Reta Kinejo de UEA [www.vimeo.com/album/1712870](http://www.vimeo.com/album/1712870).

## Oficisto de TEJO eklaboris

Multjara deziro de TEJO pri propra dungito plenumiĝis komence de oktobro, kiam la antaŭa volontulo M. Ronco eklaboris kiel duontempa oficisto laŭ decido de la Septembra

kunsido de la Estraro de TEJO. Krom diversaj administraj taskoj ŝi okupiĝos interalie pri serĉado de subvencifontoj kaj pri pretigo de subvencipetoj kaj raportoj pri la uzo de la ricevitaj subvencioj. Ŝi laboras en Torino, Italio, kaj laŭbezone vizitos la Centran Oficejon en Roterdamo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Internacia Kongresa Universitato invitas

Dum la 97-a UK en Hanojo okazos la 65-a sesio de Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko, sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; rete: [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il), ĝis 2012-01-31.

## Belartaj konkursoj en 2012

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 63-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 97-a Universala Kongreso en Hanojo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibro de la Jaro. Detala regularo estas havebla ĉe UEA. ([www.uea.org](http://www.uea.org))

## Plena de paneoj: Nomi aŭtomobilojn

La germana gazeto *Welt* raportis pri embarasa nomado de aŭtomobiloj. Ekzemple francoj tradukis la veturilon „e-tron“ de Audi per „kotamaso“ (de „etron“), la modelnomo Nova de Chevrolet signifas en Latin-Ameriko „no va“ (ne funkcias) kaj la produktnomo Uno de Fiat estas en la Finna lingvo „stultulo“.

Kolektis kaj prilaboris  
Uwe Stecher